4-a Jaro. N-o 194 APERAS  SEMAJNE 21. Junio 1928

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

PROLETARO KAJ TEKNIKO

Dum la lasta tempo la gazetaro anoncas al ni pli ol iam sensaciajn novaĵojn pri grandaj transflugoj de kuraĝaj aviadistoj. Ili atestas pri la konstanta, laŭgrada plibonigado de la teknika materialo kaj strukturo de la flugaparatoj, kiuj permesas al siaj uzantoj meti al si kvazaŭ plej frenezajn celojn: la transflugon de l' Pacifika oceano per malmulte da etapoj, la transflugon de l' polusaj dezertoj ktp. Ne pasos longa tempo, kaj nia tero estos tro malvasta regiono por la ambiciaj eksperimentantoj, kiuj eluzas rekorde la konstantajn progresojn en la tekniko!

Kio karakterizas la tutan lastan epokon de l' homara evoluo, estas tiu senhalta pliriĉiĝo de la tekniko. Se al niaj prauloj estus permesate ĵeti rigardon al la nuntempaj kreaĵoj de homaj cerbo kaj mano, ili estus tiom miregigitaj, ke la komprenpovo tute mankus al ili. La Radio kaj la lumbildaparato, la aŭtomobilo kaj la aviadilo ne nur estas lastdataj kreaĵoj, sed eĉ ankoraŭ konstante transformiĝas kaj pliperfektiĝadas laŭ formo kaj povo.

Sed ne tio devas pleje haltigi nian intereson, ĝis kie povos konduki la homaron tiu evoluo. Plej grava por ni estas la demando, kiel ĝi adaptiĝas al la homa socio, kiajn efikojn ĝi havas sur ĝin? Objektive la kapitalismo kaj ĝiaj malhumanaj kondiĉoj permesis la kreiĝon de la teknika progreso. Estas konstato, ke la mirindaj industriaj produktoj kreiĝis tiel perfekte sub la socia sistemo de ekspluatantoj kaj ekspluatatoj. Tio ne estas miriga, ĉar jam antaŭ jarmiloj ni vidas leviĝantaj admirindajn konstruojn, la piramidojn en Egiptio, sub sklava sistemo, kiu igas mortaĉi milojn kaj milojn da sklavlaboristoj ĉe tiu konstrulaboro. Nenio malnormala en tiu evoluo: la intelekto, kiu kreis tiujn grandiozajn teknikajn atingaĵojn, ne evoluigis sampaŝe la homan moralon, la kapablon al justeco. La kelkmiljara homara historio al ni konata, plena de klasbataloj, evidente montras, ke ĝis hodiaŭ la homo ne sukcesis organizi sian socian vivon laŭ kondiĉoj, kiuj garantias al la individuo kaj al la kolektivo bonstaton kaj pacon. La fenomeno de l' militoj interhomaj restas hodiaŭ en sia sama akra signifo kiel antaŭ jarcentoj kaj jarmiloj. Nur ŝanĝiĝis la formoj, la amplekso, la organizo kaj la rimedoj. En tiu rilato ŝoviĝas — por la ĉeestintoj de l' lasta buĉado neeviteble — en la brulpunkton[1]) de l' konsideroj la fakto, ke la teknika progreso ĉiam unuavice servis kaj servas al la milito. Neniam oni tiom brile komprenis apliki la teknikajn novaĵojn ol dum la militoj. La gaskatastrofo en Hamburgo antaŭ kelkaj semajnoj reatentigis la publikon denove al la "progresoj", kiujn regalos al ni la plej venonta konflikto, kiu ne povos esti solvata pace...

La homa spirito trovis kampon por aktiviĝo, semis kaj rikoltis mirinde en la regiono de tekniko. Tie la spiritlabora progreso estas rektlinia kaj absoluta. Dume la sociaj rilatoj inter la homoj restas kaosaj, la sociaj demandoj nesolvitaj. La homa racio tie malfunkcias. Oni liveris tiun regionon al la homaj sentoj, la pasioj. Anstataŭ racie pensi, la homoj dronas en marĉo de patriotismo. En la sferon de malnoblaj pasioj la konscia burĝaro kuntiras la nekonscian Proletaron.

Sed kiel, se la Proletaro raciiĝinte, konsciante pri sia situacio, venke batalas kontraŭ la nuna socia sistemo? Kiel ĝi profitigos al si la akiraĵojn de la antaŭa epoko, la progresojn teknikajn? Kiel ĝi regos tiun tutan teknikan aparaton, kiu kreita de la burĝaro, hodiaŭ estas plene kaj sole en manoj de la kapitalistoj?

Iuj laboristoj povus argumenti, ke la ŝanĝo de la sociordo ne havas rilatojn al la tekniko, eĉ ke la teknikaj akiraĵoj estas kontraŭbatalindaj kiel kaŭzantoj de la socia mizero (oni vidu la ekzemplon de la "maŝinatakantoj"!); ke la kondiĉoj en la prakomunisma epoko, la justa dispartigo de la terpecoj, la senteknika, senindustria periodo donis sufiĉan kvanton da feliĉo kaj bonstato al la homoj. Tiuj bonintenculoj tute forgesas, ke la hodiaŭa laborista amaso konsistas en sia ĉefa kaj decida parto el produktantoj en la granda industrio, ke ili vivas per kaj pro ĝi. Redeziri epokon de kamparana komunismo signifus starigi postulon de memmortigo, ne konsiderante, ke la regresa evoluo estas reale neimagebla (escepte en tiu fantazia okazo, ke en estonta milito reciproke la malamikaj armeoj sukcesus per la kemio ekstermi la tutajn ĉefindustriajn regionojn).

La moderna socialisma movado naskiĝis kun la grandindustrio, kun la fabriklaboristaro. Kvankam la ideala

---

[1]) t. e. la punkto, al kiu koncentriĝas la intereso plej forte.

fincelo de la hodiaŭa laboristo estas la sama kiel tiu de la antaŭ-miljara ekspluatito — ĉu kampara, ĉu metiista, ĉu surgalera — la praktikaj, proksimaj taskoj de la batalantoj de hodiaŭ estas aliaj.

La Proletaro, celanta al potenco, bezonas ekposedi la tutajn kreaĵojn de la burĝaro, ĝian tutan teknikan aparaton. Kiaj malfacilaĵoj estiĝas en tiu "transira" periodo, montriĝas aktuale en la ekzemplo de Sovetio. La manko de teknikistoj - specialistoj, ĝia deviga pruntepreno ĉe la klas-malamiko, kaŝas en si grandegan danĝeron. La ĵusa Donec-proceso eklumigas la problemon. Estas Lenin, kiu tre klare ekkonis la necesecon de l' teknika konkiro, por konstrui la socialisman socion. Lia formulo, ke komunismo estas soveta potenco plus elektrumado, konservas sian valoron.

Ĉu estas kaŭzo por ĉagreniĝi, se grandaj kapitalistaj entreprenoj donas la monon por ebligi iun grandiozan teknikan venkon kiel la transoceanan flugadon? Ke tiu mono estas elspezata por progresiga celo, kiu servos al la Proletaro mem, en la momento kiam ĝi transprenos la potencon? Tio ne signifas, ke ni ne plej akre kontraŭbatalu tiun saman kapitaliston (kvankam li ebligas iun teknikan rekordon) kiel reprezentanton de sistemo, en tiu socia pozicio, kiu lin devigas ekspluati la laboristojn.

Tasko de la Laboristaro estas, lerni regi mem la maŝinojn kaj aparatojn, kiuj servas al la evoluo de la tekniko. La transiro de la potenco de la burĝa klaso en la manojn de la Proletaro starigas ĉi lastan antaŭ gigantaj taskoj. La plej malfacila certe estas regadi la teknikon: ne nur scii produkti per la mano la modernajn maŝinojn kaj kemiajn substancojn, sed scii per la intelekto pri ilia strukturo, ilia kunmetiĝo, ilia mekaniko, por ilin regadi.

N-o.

Ĉiu klera aŭ kleriĝema homo ne povas ne studi la ideojn de *N. Lenin.*

Tial ĉiuj esperantistoj, ĉu amikoj ĉu malamikoj de la gvidinto de l' sovetia revolucio, devas nepre havigi al si la verkon:

ŜTATO KAJ REVOLUCIO

tradukita el la rusa lingvo
de *G. Demidjuk*

Form. 18×12, 150 paĝoj. Prezo 1 g. mk.

Mendu senprokraste al **Adm. de SAT., Colmstr. 1-III, Leipzig O-27.**

LA PERSEKUTOJ EN JAPANIO

La unua ĝenerala elektado por la Ĉambro de Reprezentantoj okazis la 10. marto en Japanio. Sed la ĝenerala voĉdonrajto estas limigita al viroj pli ol 25-jaraj. La virinoj kaj ĉiu persono, kiu loĝas malpli ol unu jaron en iu loko, ne havas la rajton voĉdoni.

Pro perdo de popola konfido la faŝisma registaro de Tanaka okupas nun apenaŭ la duonon (t. e. 138 seĝojn) en la parlamento. Estas menciinde, ke la Domo de Nobeloj en parlamento okupas superregan pozicion ankoraŭ nuntempe, ĉar la japana burĝaro sen akiro de demokratio rapidege transiris en la faŝisman imperialisman periodon, laŭ la ekonomia stato. El vidpunkto de partia profito la reakcia registaro de Tanaka devis turni al alia flanko senkulpajn popolamasojn. Tiucele la registaro falsverkis dokumenton de Japana Komunista Partio por la unua fojo. Sen esplordemando multaj klaskonsciuloj estis arestataj kaj ĵetataj en la malliberejojn. Listo de japanaj komunistoj kaj protokoloj pri funkciulaj kongresoj estis falsverkataj de policaj agentoj.

Preskaŭ 1200 K-doj estas arestitaj kaj 250 el ili jam akuzitaj de publika prokuroro. Inter la multaj viktimoj troviĝas studentoj kaj junaj virinoj. Niaj malsanaj K-doj mortis pro kruelegaj policaj torturoj. La Japana Ruĝa Helpo klopodas helpi al la malsatantaj familioj de malliberigitaj laboristoj. La Laborist-Farmista Partio kaj la Maldekstra Metallaborista Sindikato kaj Ruĝa Junulara Ligo estas nuligitaj per registara instrukcio.

La registaro utiligis la militon duafoje. Celante akiri novan japanan kolonion en Ĉinio kaj por subpremo de ĉina revolucieca agado la japana registaro sendis armeon al Ĉinio. La japanaj militistoj buĉadis per kruelegaj rimedoj multajn klaskonsciajn ĉiniajn K-dojn. La krizo de proksima imperialisma milito alvenis. La faŝistoj subvenciataj de la registaro faras agitadon inter la proletaj vicoj.

Tokia SAT-ano.

JUGOSLAVAJ TURMENTEJOJ

En jaro 1921, kiam la laborista partio sendis 60 deputitojn en la parlamenton, komenciĝis flanke de la naciburĝa jugoslava registaro furioza persekutado. Ĝia sekvo estis la neniigo de laborista movado, pretekste ke la partio konspiras kontraŭ la ŝtata ordo. Ankoraŭ nun valoras la leĝo por defendi la ŝtaton. Sendependa sindikato same estas malpermesata.

Amasoj da laboristoj estis ĵetataj en malliberejojn kaj post ilia pleniĝo en la fortikaĵojn. La procesoj gvidataj en la tuta lando konatigis nin kun ĉiuspecaj barbaraj turmentmetodoj spertitaj de niaj K-doj en tiuj kazematoj. El ĉiuj turmentejoj la Beograda "Glavnjaĉa" (urba malliberejo) plej famiĝis pro la aplikataj rimedoj uzitaj dum mezepoko. Interne de ĝiaj muroj la vekrioj estis aŭdataj ĝis la strato. Per la interpelacio de la nuna parlamenta opozicio pri la Beograda "Glavnjaĉa" publikiĝis kelkaj faktoj pri la okazoj en la malliberejo, torturoj kaj turmentoj de la malfeliĉaj viktimoj. Estinta ministro de justeco rakontis jenon: 8—10 tagojn post kiam mi fariĝis ministro, mi vizitis "Glavnjaĉa" kun la intenco vidi, kiel ĝi aspektas interne. Teretaĝe troviĝas kelkaj ejoj, kiuj ne havas fenestrojn al la strato. Ili nur havas iujn etajn truetojn al unu malpura koridoro, kiu estas apartigita de alia koridoro. Tie regas tia varmego, ke dum la tagoj de mia vizito estiĝis kelkaj okazoj de sveno de malliberigitoj. Sed tio ne estas la plej malbonega afero. Mi trovis, ke ekzistas subteretaĝa loko, en kiun eniri oni malkonsilis al mi pro perdo de mia sano. Kiam mi spite la konsiloj eniris tiun ejon, mi ekmemoris ĉiujn rakontojn pri ratoj kaj serpentoj, kiujn priskribas la popola poezio. La malliberuloj enĵetataj tien kuŝas en tombejo senfenestra. Oni diris al mi, ke neniu estas tien enĵetata. Sed la okuloj de l' malliberuloj min ĉirkaŭantaj diris sendube la kontraŭon de tiu aserto de la polic-organoj.

"Kvar tagojn post mia vizito mi eksciis, ke oni tien ree enĵetis du homojn, kaj unu poste persone plendis al mi, kiel li la tutan nokton kontraŭbatalis la ratojn. Inter la malliberigitoj troviĝis ankaŭ polichelpantoj kaj agentoj, kiuj pro iu bagatelo perdis la favoron de l' urba policestro. Kaj troviĝis inter ili 11-jara laborista knabo, kiu estis malliberigita, ĉar li ne plu volis servi sub la pezaj kondiĉoj de iu metiisto . . ."

En sia interpelacio la iama ministro (faŝista) nur mencias tiujn kelkajn faktojn, sed silentas pri tio, ke dum la reĝimo de lia partio miloj da laboristoj estis ĵetataj en tiun "Glavnjaĉa". Tia estas burĝa moralo!

K-doj! Diskonigu la faktojn en viaj sindikatoj kaj partioj kaj admonu ilin direkti la protestojn kontraŭ tiun blankan reĝimon de teroro!

Jug. SAT-kor.

LA MURGAZETO EN SOVETIO

La murgazeto en Sovetio naskiĝis kun la Oktobra Revolucio. Oni povas nomi ĝin murgazeto ne nur pro tio, ke ĝi pendas sur la muro, sed ankaŭ pro tio, ke ĝi iafoje proksimiĝas laŭ sia grandeco al granda parto de la muro. Cetere oni jam prave batalas kontraŭ tiu senlima kresko de la formato, ĉar la gazeto fariĝas malfacile legebla.

Ne ekzistas fabriko aŭ laborejo, institucio aŭ lernejo, organizo aŭ societo, kiu ne eldonus sian propran murgazeton. Laŭ milionoj oni povas kalkuli la legantojn de la murgazetoj, laŭ centmiloj iliajn kunlaborantojn. La murgazeto estas la pulso de la kolektiva vivo. Ĝia kulturkleriga, politika, organiza kaj discipliniga signifo kaj efiko estas ne malpli, se ne pli granda, ol tiu de la lokaj aŭ centraj presorganoj. Ili pritraktas ĉiujn politikajn, ekonomiajn, industriajn kaj kulturajn temojn en hejmlanda kaj internacia skalo, sed krom tio ĉiun temon, kiu povas interesi la anaron de tiu aŭ alia kolektivo el profesia, industria, socia aŭ kulturkleriga vidpunkto.

Ili estas plene sencenzuraj, eĉ por dekjaraj infanoj, kiuj povas tute libere kritiki eĉ siajn instruistojn, same kiel la laboristoj siajn fabrikestrojn. La trouzo de tiu libereco estas tre malofta, ĉar ĉiuj ordonantoj kaj plenumantoj sentas sin en Sovetio Kamaradoj. Krom tio la kolektivo eldonanta la murgazeton, eĉ la kolektivo el dekjaraj lernantoj, ne permesos, ke en ĝi aperu kalumnioj. Oni ne forgesu, ke en Sovetiaj lernejoj absolute forestas iaj ajn punoj. Sed la interna disciplino en la lernejoj, ne formale sed esence, estas multe pli bona ol dum la antaŭrevolucia tempo. Ĝuste la sencenzura libera murgazeto multe helpas al tio.

Ofte la estintaj kunlaborantoj de la murgazetoj fariĝas poste kunlaborantoj de lokaj, eĉ de ĉefurbaj ĵurnaloj kaj gazetoj. Nia urba ĉiutaga ĵurnalo "Krasnojarsk Raboĉij" (Krasnojarska Laboristo) gvidas la murgazet-movadon en nia urbo kaj ĝia distrikto (ĉar en vilaĝoj ankaŭ estas eldonataj murgazetoj). Interalie estu dirate, ke la redaktoro de "Krasnojarskij Raboĉij", K-do Ĥoves, estas konata esperantisto en Sovetio. Antaŭ kelkaj jaroj li eĉ eldonis la unuan esperantan gazeton en Siberio. Tial en nia ĵurnalo ofte aperas tradukoj de leteroj de diverslandaj esperantistoj kaj miaj tradukoj el "S-ulo". Antaŭ nelonge K-do Ĥoves aranĝis ekspozicion de lokaj murgazetoj ĉe la redakcio de "K. R." kaj kunvenon de iliaj kunlaborantoj.

Fine ni diru, ke la murgazetoj estas multkolore pentrataj. Tiel la murgazeta movado ne nur helpas al la kreado de estontaj verkistoj, sed ankaŭ de pentristoj kaj ilustraĵistoj el inter la plej vastaj rondoj de la popolamasoj.

Romano Frenkel (7692).

PARIZO KAJ LA PARIZANOJ

I

Alveninte en Parizo, mi havis ankoraŭ plej freŝmemore la silueton kaj la medion de Berlino. Tiu sfero ĵus forlasita surpezis ankoraŭ mian spiritostaton kaj estis trapenetrinta mian sangon ĝis la ostoj. Grandegan urbon mi ŝanĝis kontraŭ grandega urbo. Sesetaĝajn domojn kontraŭ samspecaj, samklasaj gigantoj. Retaron da subtera tramvojo kaj aŭtobuslinioj kontraŭ samspeca. Sed tamen kia kontrasto unuavide inter ambaŭ ĉefurboj! Kiel multkolora estas jam la ekstera aspekto de Parizo kontraŭ la unuforma grizeco de Berlino!

Kompreneble, jam en la ekstera aspekto manifestiĝas la diferenca karaktero de l' loĝantaro[1]). En tiu multkoloreco, artemo, ofte kvazaŭ senaranĝa apudigo de diversaj stiloj en konstruarto oni retrovas la senzorgan facilanimecon, la gajemon, la artan senton nebriditan per disciplinaj reguloj kaj precipe la malpedantecon de l' parizano. Kontraŭe — en Berlino la grizaj vicoj da domaroj kaj stratkolonoj (cetere oni trovas ilin tre simile ankaŭ en kelkaj parizaj antaŭurboj), la senkolora nudeco, aliflanke la ekzakta pureco kaj ordemeco reprezentas la prusan disciplinemon kaj malrevemon, oftan pedantecon, akurategecon kaj kolektivsenton.

Ambaŭparte oni vidas la virtojn kaj la malvirtojn, la troigojn kaj la mankojn. Ekzistas senstilaĵoj en tiu multkolora Parizo; oni trovas terure malbele kolorigitajn domojn, arkitekture eĉ ofendajn en cetere belharmonia ĉirkaŭaĵo (ekz. la konstruo de la mensogĵurnalo "La Mateno" estas laŭ mia gusto malbelega). Tamen, vidante el la perspektivo la strataron, oni miras trovi malgraŭ la multeco da variaj stiloj belajn akordojn, harmonion. Oni neniam estas malagrable tuŝata per la surpriza apudesto de artverkoj el kvar aŭ kvin diversaj jarcentoj. Mi ne bezonas akcenti, ĉar tro multaj antaŭ mi tion faris, ke oni renkontas abundecon da arte altvaloraj konstruoj en Parizo kiel en neniu alia urbo (da pontoj, preĝejoj, militgloraĵoj, turoj, kolonoj ktp.). Cetere, de proleta vidpunkto tio nenion signifas — arta beleco ne signifas komforton por la malriĉularo, kaj ne estas konsolo por almozulo, povi dormi sub belarta pontarko . . . Tial oni, vidante tiom da amasigitaj belaĵoj kaj ĝuante iliajn formojn kaj ilian estetikan aspekton, ne povas subpremi dubon pri la neceso kaj utilo de tiuj kreaĵoj. Signoj de kulturo kaj civilizo — konsentite. Sed ni pripensu, ke antaŭ 2000, ja eĉ antaŭ 4000 jaroj grekoj, romanoj kaj pli frue babilonoj kaj egiptoj kreis artaĵojn de ne malpli granda valoro, dum ili sendube de socia vidpunkto kelktempe eĉ pli bone aranĝis siajn komunumojn, ol la hodiaŭaj respublikoj en Eŭropo . . .

Kiu bezonas refreŝiĝon de nervoj kaj korpo, ne bezonas transpaŝi la urbmurojn. Li trovas multe da verdaĵo en Parizo mem. Luksemburga Ĝardeno, Plantaĵa Ĝardeno, Parko Monceau, Buttes-Chaumont (Büt Ŝomon), Tvilerioj en centro mem. Limrande (okcidente) la Bois de Boulogne (Bulonja arbareto) kaj (sudoriente) la Bois de Vincennes (Vincena arbareto). Estas tre signife, ke la unua servas ĉefe al la burĝaro, la lasta al la Proletaro. Sed tio fariĝas komprenebla, se oni konsideras, ke en okcidento, sud- kaj nordokcidento kaj en centra parto loĝas la riĉularo, en ceteraj partoj, precipe en la tuta oriento kaj sudo — la Proletaro. La Berlinano konstatas, ke en la ĉefurbo de Germanio la loĝkvartala disdivido laŭ klasoj estas la sama: ankaŭ en Berlino la okcidentaj kvartaloj estas rezervataj al la burĝaro, kaj en oriento, nordo kaj sudo kolektiĝis la masoj da proletoj; — en la antikva centro, en Parizo kiel en Berlino, estas la administraj konstruoj, dum la registaraj jam etendiĝas okcidenten.

Mi ne diru plion pri la eksteraj aspektoj kaj la ekstereca strukturo. Mi nur menciu ankoraŭ la plej belajn memoraĵojn de glora revolucia pasinteco, la Bastille-kolonon, sur la placo kie staris la fortikaĵo de l' tiranio, kiu estis forekstermata ĝisfunde de l' parizaj laborist-amasoj, kaj la Muron de la Komunanoj en tombejo Père-Lachaise (Per Laŝez), kie estis mortpafataj de la blankuloj 1871 centoj da heroaj defendantoj de la Komuno, kaj kien ĉiujare en fino de majo marŝas honormemore la pariza revolucia Proletaro.

En sekvanta ĉapitro mi okupos min iom pri la karaktero kaj la vivmaniero de l' pariza loĝantaro, ĉar nur konante la homojn, alilandano povos kompreni la urbegon, kies unuaj impresoj tiel unike efikas sur lin.

Nubo.

[1]) La loĝantoj de Parizo (kiel al mi diris la K-doj) havas la nomon "parizano" nur, ĉar ili loĝas en Parizo. Fakte ekzistas nur malmulte da originaj "parizanoj", kaj ankaŭ ili formortos post kelkaj jardekoj. Jam nun tiu speco apartenas al la "maloftaĵoj".

VOJAĜAJ IMPRESOJ EL SUDA AMERIKO

IV

Arkipelago de Kolon apartenas al la respubliko Ekvatoro (Ecuador) kaj kuŝas 550 marmejlojn (1018 kilometrojn) okcidente de l'ekvatora bordo (0°39' n. — 1°37' s.). La insulgrupo, kiun trovis hispanaj maristoj en la deksesa jarcento, konsistas el 6 grandaj kaj dekduo da pli malgrandaj insuloj, kiuj sume areas 7640 km².

La klimato estas tre bona. Meza temperaturo ĉ. 20°. Pluvperiodo de januaro ĝis majo donas verdan koloron al la kreskaĵo, kiu dum la cetera seka jarsezono estas brungriza.

En 1832 la insularo estis oficiale okupata de Ekvatoro, kiu de tiam komencis kolonigi ĝin. Oni transportis el la kontinento brutaron, kiu nun pliiĝis je multaj miloj. La plej granda insulo Isabella areas 3760 km². Kelkaj montoj, kies suproj formas kraterojn "vivantajn", havas altecon de ĉ. 1000 metrojn. Sur vastaj deklivoj sin paŝtas trankvile miloj da brutaroj. Nur ĉ. 100 homoj vivas tie sub primitivaj kondiĉoj. Trifoje dum jaro ŝipo albordiĝas por transporti produktojn, ĉefe haŭton de bovoj, kafon kaj diversspecajn aliajn fruktojn.

Alia insulo Santa Maria areas 1370 km², kiu nun estas senhoma. Estis sur tiu ĉi insulo la fama scienculo Darwin en 1835 kaj kolektis materialojn por sia senmorta verko "La deveno de l' gentoj". Tiutempe vivis ĉ. 250 homoj sur la insulo, sed dum la sekvintaj jaroj okupis ĝin marrabistoj por ĝui la vivon mallongan kaj ofte streĉan de tia profesio. Ili renversis la kolonistan entreprenon kaj faris el Santa Maria bazon por siaj rabistaj ekspedicioj al la kontinento. Post la forpelo de la marrabistoj iu pia prezidanto de Ekvatoro volis plibonigi la morojn en sia regno. Li donis ordonon, ke ĉiuj malĉastulinoj de Ekvatoro estu sendataj al la insulo St. Maria. Multaj pli malpli kulpaj belulinoj devis dum kelka tempo pentofari en la malproksima izolejo. Sed la famo pri ilia sorto atingis ekspediciojn de fiŝistoj vizitantaj la insularon. Ili liberigis la belulinojn kaj rekondukis ilin al la kontinento.

Hodiaŭ troviĝas sur du insuloj nur ĉ. 500 homoj. La registaro de Ekvatoro subtenas la enmigradon, donante al enmigrantoj senpagan parton da kulturebla tero, sed oni devas konsideri, ke daŭras jarojn, ĝis oni povas rikolti fruktojn por vendi.

Dum 6 monatoj mi restadis sur la memvola izolejo, helpante la koloniistojn konstrui dekdu domojn, forhaki arbojn el la senpage ricevita terpeco. Dufoje ĉiusemajne mi kune kun K-do iris por ĉasi bovidojn aŭ porkidojn, aŭ remis sur la maro fiŝkaptante por nia manĝaĵa provizo. Sed la restado komencis fariĝi tro enuiga por mi, kaj mi decidis forvojaĝi al la kontinento ĉe la unua okazo, kaj iun tagon albordiĝis ŝipo kun naŭdek burĝaj politikaj ribeluloj. Ili faris konspiron kontraŭ la registaro en Ekvatoro, sed malsukcesis kaj estis kondamnataj je kelkjara restado sur la insulo San Kristobal. Inter la ribeluloj troviĝis kelkaj oficiroj, policestro de l'ĉefurbo Quito kaj kelkaj politikistoj.



Ekvatoranaj indiĝenaj muzikantoj sur San Kristobal

Tiaspecaj ribeloj estas tiel ĝeneralaj en sudamerikaj ŝtatoj, ke la mondgazetaro eĉ ne atentas pri ili. Nur kiam laboristoj faras ribelojn, la internacia kapitalista gazetaro sentas maltrankvilon. Ili bone konscias, ke la burĝaj politikistoj estas aĉeteblaj.

Muri (102).

Iuj kredas, ke la esperanta movado ne progresas kontentige, tial ke la agitado ne estas sufiĉe vigla. Tio estas nur duonvera.

Ĉefaj kaŭzoj de malrapida kreskado kuŝas en la neseriozeco de multaj varbitoj, kiuj ne finlernas la lingvon, en la nekomprenemo de multaj esperantistoj pri la rolo de la gazetaro.

Kiu ne abonas "S-ulo"-n, tiu estas nur duona SAT-ano.

La multkoloraj, ilustritaj poŝtkartoj de SAT

estas unika provo, bilde esprimi nian idealon. En la korespondado kun varbotoj tiuj kartoj estos tre utilaj al vi. Tial aĉetu ilin ĉe la **Administrejo de SAT,** R. Lerchner, Colmstr. 1, **Leipzig O 27.** La kompleta serio, konsistanta el 5 diversaj kartoj, kostas **0,50** g. mk.

TAGO DE USONA VILAĜANO

La usona vilaĝo

Ŝajnas al mi, ke inter vilaĝo eŭropa kaj usona ekzistas pli malpli granda diferenco. Pri la eŭropa vilaĝo mi formis al mi la ideon, ke ĝi estas kampareca, ke oni loĝas en vilaĝo kaj iras tage kelkan distancon por laboradi sur la kampoj. Mi provas priskribi mian vilaĝon, kiu havas ĉ. 300 loĝantojn. Ĝi kuŝas 80 kilometrojn sude de Superior (urbo kaj lago). Ĉirkaŭe estas multaj malgrandaj lagoj, kaj ĉiusomere alvenadas centoj da urbanoj por fiŝkapti kaj refreŝiĝi. Ni supozu, ke ni venas de Superior sur la U. S.-ŝoseo[1]). Unue ni transiras malgrandan rivereton. Proksime de la ŝoseo staras akvopova muelejo de negranda forto. Tie oni muelas nutraĵon kaj maizan farunon. Ni preterpasas kelkajn domojn kaj unu preĝejon kaj atingas la ĉefan straton. Tie estas la vilaĝestra domo kaj kontraŭe 2 naft-stacioj (kie oni ankaŭ vendas aŭtoakcesoraĵojn). Ni flankeniĝas kaj venas al la foira domo, nebela sed utila kiel dancejo. Post kelkaj paŝoj ĉio estas vendejo. Tiam telefona oficejo, alia butiko kaj vendejoj. Kontraŭe katolika preĝejo. Sekvas restoracio, alia vendejo, poŝtoficejo kaj banko. Nun ni preterpasas aŭtomobilejon, 2 hotelojn kaj atingas la fervojan linion kaj la stacidomon. Malantaŭ ĝi aŭtomobilejo, forĝejo kaj kelkaj restadejoj. La plej multaj loĝejoj troviĝas en la flankaj stratoj. La bankistoj kaj kelkaj laboristoj (ekz. fervojaj laboristoj) posedas proprajn domojn. La aliaj pagas luprezojn de $ 5 ĝis $ 15 monate. Oni perlaboras $ 2.50 ĝis $ 3 tage, kaj nur kelkaj havas daŭran laboron. En la aŭtomobilejo oni laboras ĉ. 8 monatojn dum la jaro. Lastatempe la laboro estas plej multa en la papera-ligna industrio. Oni tranĉas kaj portadas la lignon somere kaj vintre. La laboro estas pagata laŭpece. Oni ricevas 3 cendojn por peco, kiu devas esti precize longa 2.40 m., kaj oni devas amasigi la pecojn. Ĝenerale estas tendaro en la arbaro, kie loĝas kaj manĝas la lignolaboristoj. Kiu multe laboras, ricevas bonan pagon, sed la oficisto, kiu kalkulas la pecojn kaj donas la monon, multe pli ricevas kaj neniom laboras. Por manĝaĵo kaj loĝado tiuj laboristoj pagas semajne 7 dolarojn.

Aliaj laboras tage, hodiaŭ ĉi tie, morgaŭ tie, ĉe iu vilaĝano aŭ eble terkulturisto, kaj dum la rikolta tempo iuj iras al la rikoltaj kampoj en ŝtato Dakota.

Ĉiam dum somero okazas pilkludo

[1]) U. S. = United States = Usono.

TRA ESPERANTIO

LA SVEDA LABORISTARO DECIDIS

La kongreso de la sveda socialdemokrata partio unuanime voĉdonis por esperanto. — Postulas ĝian instruadon en la lernejoj de la tuta mondo. — Alvokas la Laboristaron lerni kaj uzi esperanton.

Kiel ni jam komunikis, la 30. 12. 1927 la soc-dem. lab. komunumo de Stokholmo voĉdonis proponon al la soc-dem. landa kongreso en la intereso de esp-o. La landa kongreso, kiu havis la taskon pritrakti tiun proponon, ĵus okazis en Stokholmo, la 3.—10. junio, en la nova Koncerta Domo, kiu refoje fariĝis scenejo de nova gravega venko por esp-o.

La postulo de la originala propono estis la jena: “La kongreso decidu admoni siajn reprezentantojn en la parlamento labori por la enkonduko de esp-o en la lernejoj, almenaŭ kiel nedeviga objekto, la ŝtato donu subvencion por edukado de esp-instruistoj, la soc-dem. lab. partio donu al la esp-movado ĉian moralan apogon.“

La partia estraro, pritraktinte tiun proponon, rekomendis ĝin al la kongreso en la jena formo: “La kongreso deklaras sian simpation por la interkompreniga laboro de la esp-movado, admonas la membrojn de la partio lerni esp-on, uzi ĝin en la internaciaj rilatoj kaj ĉiamaniere apogi kaj vigligi la esp-movadon.“

La diskuto pri la poresp-a propono okazis la 5. junio. En la diskuto partoprenis sep personoj, ĉiu parolis por la propono, neniu kontraŭ, kaj la decido estis unuanime aklame farata.

La partiestraran proponon prezentis parlamentano Ernst Eriksson, la malnova konata pioniro de esp-o, kaj li forte substrekis la necesecon enkonduki esp-on en la internacian lab. vivon. La urbestro de Stokholmo, senatano Carl Lindhagen akcentis, ke esp-o estas jam vivanta lingvo. Li ŝerce alparolis la estintajn kontraŭulojn de esp-o, kiuj lastatempe konvertiĝis, speciale tiujn, kiuj antaŭ nelonge en la sveda parlamento kontraŭbatalis esp-on, sed nun konsenteme sidas en la benkoj. Fine li faris aldonan proponon al la teksto de la partia estraro. Redaktoro Allan Vougt el Malmö esprimis sian opinion, ke oni ne povas havi kaj deziri pli bonan artefaritan lingvon, ol esp-on. La lingva problemo estas proleta problemo. Li montris al la grandaj lingvaj malfacilaĵoj, tre aktualaj ĉe la Laboraj Konferencoj en Ĝenevo. S-o Torsten Andrén el Lund deziris la akcepton de la originala propono kun la aldono de urbestro Lindhagen. La estinta sveda ĉefministro direktoro Rickard Sandler deklaris sian intereson por la mondlingva ideo pro siaj malagrablaj spertoj en intern. kongresoj. La alprenado de novaj kongreslingvoj kreas pli kaj pli netolereblan situacion en la intern. konsiliĝoj. Nun ŝajnas, ke esp-o havas la plej bonajn ŝancojn. En la nuna momento tamen la lerneja instruado ankoraŭ ne estas efektivigebla pro la manko de instruistoj. Li apogas la proponon de la partia estraro.

Post rebatoj de kelkaj parolantoj la fakoficisto H. Molander opinias, ke ĝuste la manko de instruistoj necesigas la parlamentan pritraktadon de la demando. Estinta ministro de laboro s-ro Gustav Möller estas konvinkita, ke la malgrandaj nacioj deziras esp-on, sed timas kontraŭstaron ĉe la grandaj popoloj. Tial li postulas, ke la problemo estu diskutata ankaŭ en intern. kunveno.

Post tiu diskuto la kongreso unuanime akceptis la supre cititan proponon de la partia estraro kaj poste la aldonan proponon de urbestro Lindhagen: “La kongreso esprimas la deziron por intern. interkonsento pri la akcepto de esp-o kiel mondlingvo, kaj ĝia instruado en ĉiuj lernejoj de la tuta mondo; la partio faru por tio klopodojn.“

Estis interese observi, ke la balkona aŭskultantaro sekvis la diskutadon kun vigla intereso, kiu post la decidiĝo eksplodis en tondra aplaŭdo. Same la energia aklamo de la delegitaro kaj ĝia forta aplaŭdo pruvis pri vera entuziasmo por la farita decido. La eksterordinaran gravecon de la decido klarigas la fakto, ke la sveda soc-dem. partio estas la plej granda politika partio de la lando. Ĝi havas pli ol 200 000 membrojn, preskaŭ la duonon de la sveda parlamenta deputitaro kaj pli ol trionon de la senato. La partio havas fortan esperon, ke post la aŭtunaj parlamentaj elektoj ĝi formos la novan svedan registaron.

John Johansson, Stokholmo.

---

dimanĉe. Ĉiu pagas al la ludantoj laŭvole. Ĝenerale la ludantoj estas laboristoj el la vilaĝo. La terkulturisto kaj farmisto loĝas en sia propra domo sur siaj propraj kampoj. Se li bezonas laboristojn, li iras al la vilaĝo. La vendado kaj aĉetado okazas ĝenerale en la vilaĝo, sed kelkaj vendas kaj aĉetas en la grandaj urboj per poŝto kaj fervojo. Preskaŭ ĉiu terkulturisto havas aŭton kaj ankaŭ kelkaj laboristoj. Kiel laborista aŭto ĝenerale estas uzata tipo “Ford“, kiun oni malkare aĉetas kaj mem riparas.

En bona jaro ni ankaŭ havas multajn bluberojn kreskantajn tra la arbaro. Oni ricevas milojn da dolaroj por ili. Viroj, virinoj kaj infanoj dum julio ricevas bonan monon rikoltante la bluajn berojn. Sed bedaŭrinde ne en ĉiu jaro ili maturiĝas.

Mia vivo en vilaĝo

Mi estas 63-jara kaj laboras nuntempe kiel hejtisto en nia altlernejo. Dum malvarma vintra vetero mi ellitiĝas je la 4-a. Tuj mi klopodas pri la fajro en la forno. Bone mi devas prizorgi, ke estu sufiĉe varme je 8.30 horo, kiam mi sonorigas la sonorilon kaj iras al mia matenmanĝo. Mi reiras al la lernejo 1½ aŭ 2 horojn pli poste kaj donas al la forno pli da karbo. Mi restas tie ĝis la 13-a, kiam mi ree sonorigas la sonorilon kaj iras tagmanĝi. Post 1½, 2 horoj mi revenas. Je la 16-a mi balaas la lernejon, zorgas pri la lavejo ktp. Ĉirkaŭ la 18-a mi finas la laboron kaj vespermanĝas. Poste mi legas kaj skribas, ofte esperanton, ĝis la 21-a. Tiam mi pretigas la fajron por la nokto kaj enlitiĝas.

Dum la malvarma vetero mi dormas apud la forno. Ankaŭ mi devas zorgi pri la akvo, elektra motoro, pumpilo ktp. Kompreneble, kiam estas varme, mi ne havas tiel multe da laboro, kaj mi povas dormi hejme. Ankaŭ mi plantas ĝardenon hejme. En tiu ĉi jaro mi laboros 10 monatojn. Estas nur 9 monatoj da lerntagoj, sed mi havis monaton da laboro pretigante la domon kaj rebonigante ĉion. Mi ricevas sesdek dolarojn monate kaj devas mem min loĝigi kaj manĝigi[1]).

Mi lernis esperanton, kiam mi estis 59-jara, per vortaro kaj iom da legaĵo. Ĝis nun mi estas la sola esperantisto ĉi tie kaj nur sukcesis interesi tri gejunulojn. Ŝajnas, ke la geinstruistoj ne ŝatas nian lingvon. La K-doj devas memori, ke Usono estas libera lando nur por tiuj, kiuj pensas kaj opinias kiel la registaro. (Ne nur tie! Red.) Cetere mi estas devigata, ĉiumatene en la lernejo levi la usonan standardon kaj nokte mallevi ĝin. Certe, por instrui al la gejunuloj la patriotismon, por ke ili volonte mortu por defendi la monsakon de iu riĉulo.· (10 449)

[1]) Oni komparu la diferencon de salajroj inter urbo kaj kamparo. Vidu, kiom pagas Ford al la laboristoj (n-o 188, 1-a paĝo). — Red.

GRANDA KONGRESAFIŜO

trikolora

aperis por varbi al nia 8-a Kongreso en Göteborg

ĈIU PROPAGANDISTO tuj havigu al si senpage per la Kongr. Komitato, Box 73, Göteborg.

Korekto. Bedaŭrinda gramatika eraro troviĝas en n-o 192, pĝ. 293, lino 7 de supre. Devas teksti: interesi (anst. interesigi). Oni povas interesigi, t.e. fari interesan kurson, sed oni nur povas interesi lernantojn.

Fermu viajn leterojn per niaj sigelmarkoj. Prezo: 200 pecoj 1.— mk. g.

8-a Kongreso de SAT
en Göteborg (Svedio)

(14—19. aŭgusto 1928)

Ĉion, kio rilatas al la kongreso adresu al: *Einar Adamson, Box 73, Göteborg, Svedio.*

11-a komuniko

Tagordo de Studenta kunveno

1. Raportoj de sekretarioj (K-doj Snejko k Muravkin),
2. Pri la interligo de studentaj organizoj per nia aparato,
3. Pri estonta laboro de Sekcio,
4. Pri SS-paĝo,
5. Elektoj kaj diversaĵoj.

Kongresafiŝojn ni sendis al ĉiuj, kiuj petis pri ili. Se iu petinto ne ricevis, tio dependas aŭ de malbona adreso aŭ de la poŝto.

La 8-a listo de aliĝintoj

251	Pierre Grignard, Verviers, Belgio	1854
252	Joh. Temmer, Tallinn, Estonio	2287
253	Karlo Urban, Warnsdorf, Ĉeĥosl.	9558
254	Ernesto Pfohl, Warnsdorf, Ĉeĥosl.	936
255	Franz Görlich, Nowawes, Germ.	
256	Alfred Thomas, Dresden, Germ.	8075
257	Albert Lehns, Dresden, Germ.	10 245
258	John Wilkie, Glasgow, Anglio .	10 029
259	Willy Weissbach, Kändler, Germ.	
260	K. Lapenko, Vitebsk, Sovetio . .	
261	Harold Basford, Derby, Anglio .	10 509
262	Oliver G. Groves, Derby, Anglio	7553
263	Jakobo Wild, Schlieren, Svisio .	9542
264	Hans Wirz, Zürich, Svisio . . .	1446
265	Herm. Schmutz, Allschwil, Svisio	4472
266	Jeanne Schmutz, Allschwil, Svisio	12 278
267	Alfredo Rehmann, Basel, Svisio .	4473
268	Karlo Deutschle, Basel, Svisio .	3477
269	Georg Filipov, Ĥarkov, Sovetio	5221
270	Vasilij Ĥoroŝev, Moskvo, Sovetio	7206
271	Serges Stepanov, Pavlovskaja, Sovetio	6062
272	Sala Kudrjavickij, Dnepropetrovsk, Sovetio	10 262
273	Nikolao Aleksandrov, Dolinskaja, Sovetio	5875
274	Andrev Pomelilo, Moskva-Vjatka, Sovetio	9929
275	Pavel Polivanov, Belogorod, Sov.	11 562
276	Grigorij Artemjev, Nalĉik, Sov.	1080
277	Gregoro Zarubin, Livni, Sovetio	3372
278	Viktoro Strijak, Ĥarkov, Sovetio	5634
279	Karl Ekvall, Hinshult, Svedio .	
280	Kastova Klavdije, Naro-fominsk, Sovetio	11 340
281	Artur Lundgren, Hälsingborg, Svedio	
282	Nikolau Porosov, Pskov, Sovetio	6290
283	N. Th. Tobiasson, Göteborg, Svedio	11 846
284	Edmondo Ĉiĥaĉov, Kamenskoje, Sovetio	6353
285	Kurt Werner, Leipzig, Germanio	

Sekvantaj organizoj elektis oficialajn delegitojn al nia 8-a:

Metalista sindikato de Göteborg: Anton Norling, Ernst Ohlsson, Karl Vidfors k Ossian Kristensson.

Sindikato de Marfabriko ĉe Eriksberg: A. E. Andersson.

Sindikato de Elektrofabrikaj laboristoj en Göteborg: Gustaf Engman.

SAT-KONFERENCO
18./19. aŭgusto 1928 en Göteborg

2. Komuniko

Aliĝintoj: — (3) National Council of Labour Colleges (Nacia Konsilantaro de Laborist-Kolegioj).

Krom K-do Kolĉinski neniu el la SAT-anoj proponis ion pri la afero. Ni ankoraŭ atendas la rezulton de la represo de la invitletero en diversaj ĵurnaloj k la peno de kongresanoj havigi mandaton por la konferenco. Ĉiu, kiu havas proponon aŭ raporton pri iu punkto de la tagordo (vidu n-ojn 181 k 185), sendu tuj, ĉar la fina invito estos dissendata komence de julio.

Pri la korespondado

Temas pri du principaj problemoj: unue, la fuŝskribado de leteroj, kaj due, la malseriozeco rilate la respondadon. Unue: Komenci la korespondadon devas nur tiu, kiu jam posedas la korektan uzadon de l' principaj reguloj kaj scipovas kunligi la vortojn por la tiel nomata vortfarado. Malprava estas la opinio de multaj instruistoj, ke fininte la kurson oni tuj povas kaj devas komenci la korespondadon. Tie ĉi oni devas mencii, ke nur tiuj estas kapablaj ekkorespondi, kiuj finis laŭ rekta metodo (Petro) sub gvidado de sperta kursgvidanto. Eĉ en tiu ĉi okazo estus dezirinde, ke la korespondanto antaŭ ol forsendi la leteron, donu ĝin al iu spertulo por korekti. Grandskale malutilas al la esperanta movado tiuj, kiuj anstataŭ finlerni, komencas korespondaĉi. Ŝajnas, ke superflue estas doni faktojn; ĉiuj scias, ke ili abundas.

Due: multe da Gek-doj jam plendis, ke forsendinte multajn leterojn sekve de anoncoj en "S-ulo" ili ricevis neniun respondon. Kion fari? — La plej efika kontraŭagado estus publikigi en "S-ulo" la nomojn de tiuj malseriozuloj, kiuj malhelpas la antaŭeniradon de nia movado. Sed kompreneble ne en ĉiuj okazoj regas la malbonvolo de korespondanto. Okazas, ke anoncinte sin en la gazeto oni ricevas tiom da leteroj, ke fariĝas neeble respondi al ĉiuj. Tiuokaze la anoncinto devas almenaŭ doni al la atendantoj aliajn korespondantojn el sia distrikto. Ŝajnas, ke kun iom da bonvolo la demando povas esti efike solvata.

Rapide proksimiĝas la Kongreso: do estus dezirinde, ke ĝis tiam la problemo pri korespondado estu detale pritraktita kaj finsolvita. Silentemulo (10 823).

Rimarko. — Oni ja povas "detale" pritrakti la demandon, sed ĝin solvi estas pli malfacile. Ne sufiĉas kongresaj decidoj, aŭ estraraj admonoj, por ke ĉiuj SAT-anoj fariĝu seriozaj, lertaj kaj akurataj. E. L.

E. IZGUR

NUR VOLU!

La festo de laboro kaj paco
Unuamaja kanto de ribelo

Eldono dua, reviziita kaj ilustrita

Prezo: 0,70 mk. g.

Mendu ĉe Administracio de SAT

Rich. Lerchner, Leipzig O 27
Colmstr. 1 (Germ.)

LABINTKOR
Peto al sovetiaj Gek-doj!

Plej efika rimedo por pruvi taŭgecon kaj valoron de esp-o, sendube estas korespondado de lando al lando, de laborejo al laborejo, de organizo al organizo. Pri tiu fakto ni plene konvinkas. Krom tio "labintkor" havas atentindan signifon por unuecigo de proleta klasbatala fronto en Tutmondo.

Ni do esprimas la deziron, ke sovetiaj Gek-doj, kiuj modele por proletoj en tuta mondo aplikas tiun labintkor-on peresp-an, ne laciĝu sed plej insiste daŭrigu siajn laborojn.

Peton atentendan ni tamen havas. Ĉiutage trafas nin deko da leteroj, poŝtkartoj ktp. kun petoj, serĉi korespondantojn, interligi sovetiajn grupojn kun alilandaj prolet-organizoj ktp. Volonte ni plenumus ĉiujn tiajn petojn. Sed ni avertas vin, ke niaj fortoj bedaŭrinde ne sufiĉas, por kontentigi ĉiujn petintojn. Por eviti, ke vi malsukcesos, en intereso de "labintkor" mem, konsideru ke ni jam havas sufiĉe gravan taskon je bono de nia, je bono de ĝenerala tutmonda laboristmovado. Ni tre bone povas imagi vian situacion, sed tamen ree devas admoni vin, serĉi korespondantojn per koresponda fako en S-ulo.

Centrejo de Esperanto-Servo.

AL TUTMONDA GEKOMJUNULARO!

Dum la 8-a tutsovetia kongreso de V. L. K. S. M. (junkomunista organizo) la 5. majo ni aŭdis pri la rilatoj de la organizo al esp-o. La sekretario de l' Ekzekutiva Komitato de Komunista Junular-Internacio, K-do Ŝackin, raportis pri internacia edukado de komjunularo kaj tuŝis la demandon pri esp-o, dirante: "Nia ĉiama vidpunkto estas tiu, ke esp-o kompare kun ĉiuj vivaj lingvoj estas senviva afero en tiu senco, ke, ellerninte esp-on, vi ne povas konatiĝi kun politika vivo de iu lando, vi ne povas legi gazetojn kaj librojn presitajn en iu lando, aŭ kiam al ni alveturas delegitaro, vi ne povas paroli kun ili. Ni ne volas malpermesi al junkomunistoj lerni esp-on. Ni devas gvidi tiun, kiu volas lerni ĝin, sed nia fundamenta direkto estas al vivaj eksterlandaj lingvoj, nia fundamenta helpo al tio, fundamentaj rimedoj laŭ tiu vojo, rekomendi al la laborista junularo studi vivajn eksterlandajn lingvojn."

Kiel malĝojige kaj bedaŭrinde estas, aŭdi tiajn vortojn de gvidanta K-do. Neniu el ni dubas pri la utopio pensi, ke laborista junulo facile lernos "vivan" eksterlandan lingvon. Kaj krome — kiun lingvon lerni, por ne ofendi la komjunularon el aliaj landoj? Ĉu germanan, ĉu francan, ĉu ĉinan, ĉu ankoraŭ kelkajn centojn da "vivaj lingvoj"? Ĉu vere esp-o ne jam servas al ni plej bone en nia internacia junkomunista korespondado? Ĉu ni ne havas kelkajn centmilojn da esp-istoj-komjunuloj[1]) kaj nur dekojn da sciantoj de "vivaj lingvoj"?

Al mi ŝajnas, ke por forigi tian danĝeran situacion en nia organizo, ni junkomunistoj jam konvinkitaj pri esp-o, ĉiuloke ankoraŭ pli vigle eklaboru, pliperfektigu kaj utiligu esp.-servon al komjunulaj organizoj. Junkomunistoj-esp-istoj de ĉiu urbo organizu sian korespondaparaton, helpu al ĉiu komjunula ĉelo per adreso, traduko ktp. Tie, kie ne ekzistas unu komjunulo-esp-isto en tuta urbo, la urba esp.-organizo komisiu al kelkaj el siaj K-doj helpi al junkomunistaj organizoj trovi adreson kaj skribi leteron.

Kremenĉug (7113).

---

[1]) La K-doj certe troigas. Estas vere, ke centmiloj da homoj eklernetis nian lingvon. Sed tio estas ne grava: tiom longe, kiam "S-ulo" havos nur kelkajn milojn da legantoj, ni ne rajtos fanfaroni pri granda disvastigiteco de esp-o. — Red.

INTER NI

— Ĉiu SAT-ano devas esti ateisto, devas malkonfesi dion kaj ĉion religiecan.

— Persone mi emus aplaŭdi al tiu rigora postulo. Tamen, ĝia apliko kondukus al la eksigo de 95 0/0 el la nunaj anoj . . .

— !!??

— Vi miras. Aŭskultu, kara samopiniano. Unue ni ne devas forgesi, ke famaj filozofoj ankoraŭ nuntempe disputas pri ekzisto aŭ ne-ekzisto de dio. Jen iu starigis 12 pruvojn kontraŭ la kredo je dio! Sed aliu respondis per starigo de 14 pruvoj favoraj al la diisma tezo. Ni do modeste konfesu, ke la demando staras ekster nia kompetenteco . . .

Lastatempe K-do Saklatvala, la sola komunista deputito en Britio, sciigis per bele presita karto el luksa papero al siaj konatoj, ke liaj du knabinoj ĵus estis konfirmitaj en la religioj de l' Parsioj (Zoroastranoj). Tia ceremonio konsistas en ŝmirado sur la vizaĝon per malseka faruno. Nu, ni supozu, ke tiu bone konata kaj flama revoluciano estus SAT-ano. Ĉu do ni devus eksigi lin? . . .

Iuj asertas, ke la kulto, kiun oni ĝenerale havas por kadavroj, estas plej evidenta pruvo de religieco ĉe la kultantoj. Ĉu ni sekve devus eksigi la K-dojn el Sovetio, kiuj enbalzamigis la kadavron de Lenin kaj starigis por ĝi maŭzoleon? . . .

Jen vidu: tuta kunvenantaro ekstaras kaj demetas la ĉapelon ĉe kantado de "Internacio". Ĉu tio ne estas religia gesto? . . .

Nu, mi ekvidas ĉe via fingro oran ringon! Se vi konsentus aŭskulti, kaj se ni havus tempon, mi povus per bonaj argumentoj pruvi, ke tio estas restaĵo de religio, kaj sekve, ke oni ankaŭ devus eksigi vin el SAT . . .

Kredu min, estas jam tre grava fakto, ke oni povas en "S-ulo" priparoli tute senĝene tiujn demandojn. Se ni starigus dense plektitan barilon ĉe la enirejo de SAT, estas timinde, ke nia organizo baldaŭ fariĝus malgranda sekto, sen agadkapablo, sen edukpovo — sen vivrajto . . .

SAT devas esti edukejo. Kaj por trafe eduki necesas kompari la ideojn, la programojn, la taktikojn . . .

Ni ne postulu, ke ĉiu SAT-ano malkonfesu ĉion religiecan. Ni kontentiĝu per pli modesta postulo: ĉiaj ajn dogmanoj ne rajtu eniri la SAT-edukejon — kaj tie ni zorgu, ke la dogmemuloj ne regu. Ni ne samigu edukejon kun dresejo . . .

Kiuj kredas, ke ili estas posedantoj de la tuta vero, tiuj ja ne povas edukiĝi. Edukiĝo ne povas akordiĝi kun idea ŝtoniĝo. Kaj ni ne opiniu, ke nur en la eklezioj troviĝas kreduloj, t. e. homoj kun ŝtoniĝintaj ideoj . . . E. L.

Kun la hodiaŭa n-o de "S-ulo" estas ekspedata "Sennacieca Revuo"

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

AŬSTRIO. Graz. Unuan fojon la publika institucio "Laborista Ĉambro" aranĝis esp.-kursojn, kiuj preskaŭ nur de socialistoj estas vizitataj. Lab. Ĉambro estas ŝtata institucio por leĝa defendo de lab. rajtoj k por lab. klerigado. Ni nur post multaj penoj k intertraktoj atingis la aranĝon de l' kursoj. (10 881) — **BRITIO. Londono.** Subĉielan lernejon ĉe Flackwell Heath (Flaküel hith) partoprenis 25 K-doj 6. 5. C. W. Veness parolis pri "ŝovinismo en la lernejo", M. Starr pri "vivo k verko de Baghi", I. Flower pri "la karbindustrio". La Edinburga Lab. Grupo nun malfermis sian klubon ĉiuvespere ĉe 5 Hill Crescent. En la majtaga manifestacio de Ŝefild portiĝis standardo donacita de K-doj el Kurgan (Sovetio). Speciala rapida korespond-kurso komenciĝis sub aŭspicioj de "Daily Herald" (Ĉiutaga Heroldo) la 18. 5. kun 100 studantoj. Alia unutaga lernejo stariĝos ĉe St. Albans (proksime de Londono) 24. 6. Pro biletoj k detaloj skribu al BLEA, Sekt. 57, Hedsor Bldgs., London E. 2. — **FRANCIO. Parizo.** 3. 6. okazis la historia marŝado de la Pariza Laboristaro al la Muro de la Komunanoj de 1871. La Esp. Lab. Grupo ĝin partoprenis kun afiŝego surportanta nian agitvorton kaj standardoj, same grupoj el la ĉirkaŭaĵo. La esp.-kantado trovis la vivan aplaŭdon de la amasoj. Estis disvendataj kvincent broŝuroj, disdonataj flugfolioj. — **POLIO. Varsovio.** Dum 2-a tutpola kongr. de esp-o en Krakovo (pentekoston) okazis kunveno de lab. esp-istoj (15 pers., reprez. 9 urbojn), organizita de Lab. Esp. Societo "Laboro". Oni decidis, ke tiu ĉi Societo eklaboru, por unuigi ĉiujn lab. esp-istojn en Polio (grupojn k izolulojn), kiuj fariĝu filioj aŭ membroj de "Laboro". K-do Litaŭer atentigis la Tutpolan Kongr., ke la lab. organizoj partoprenas la ĝen. esp. movadon nur ĝis maturiĝo de la klasa lab. movado esp-ista k ebleco sendependiĝi la prol. esp. laboron de la ĝen. esp. movado en Polio. — La centra ĉiutaga organo de Pola Partio Socialista "Robotnik" (Laboristo) enhavas lunde esp. angulon. Centra semajna org. de PPS "Pobudka" (Veksignalo) enpresas esp. kurson (iom plimallongigitan Petro-n kun polaj rimarkoj k trad.). Ĝi salutis per esp. lingva art. la lab. kunvenon de l' Krakova Kongr. Monata Liberpens. gaz. "Zycie Wolne" (Libera Vivo) presas sur la unua paĝo esp. lingvan resumon de l' enhavo. — **SOVETIO. Groznij.** Ĉi tie estas instalita radiosendilo. En kunveno de radioamikoj K-doj Kolpakov k Rösch pledis por utiligo de esp-o. Oni projektas kurson por aŭtuno per radio.



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Prof. Sir Arthur Keith, Pri la Origino de l'Homo. Prezidanta parolado farita ĉe kunveno de la Brita Asocio por la Antaŭenigo de Scienco en Leeds, 31. aŭg. 1927 k lastatempaj traktatoj pri Darwinaj temoj. Trad. Prof. Wm. Brown k F. R. A. Mc Cormick. Eld. The Esperanto Publishing Company Ltd., 142 High Holborn, London W. C. 1. 64 pĝ. Broŝ. Pr. 1 ŝ. 9 p. Afranko: 2 p.

Martha L. Root, Bahaaj pruvoj de vivo post morto. Bahaa Esp. Eldonejo, Wandsbek (Germ.), poŝtfako 8. Okpaĝa traktaĵo pri la senmorteco de la homa spirito laŭ la Bahaa doktrino. Prezo nemontrita.

Raporto de la Aerologia Observatorio de Tateno. N-o 2. Eld. la citita observatorio en Tateno apud Tutiura (Ibaraki-ken), Japanio. 1928. Form. 22½×30 cm. 174 pĝ. broŝ. Prezo nemontrita. — Pli k pli la ekstrema oriento utiligas praktike esp-on per siaj eldonaĵoj. Tiu ĉi ampleksa raporto de meteorologia observejo kun tabeloj, statistikoj ktp. nur en esp-o estas plej bona pruvo, ke esp-o estas aplikebla en ĉiuj fakoj.

La Esperanta Vortfarado
laŭ la Fundamento
de Paul Fruictier

Unika verko en nia lingvo, kiu detale pritraktas la derivadon kaj la signifon de l' afiksoj kaj de l' prepozicioj. La sola libro, kiu faciligos al vi la komprenon de la vortfarada meĥanismo.

Prezo: **1,80 mk. g.**

Havebla ĉe Administracio de SAT

ISK

Internacio de Socialista Kunbatalo

La politika revuo por la klaskonscia laboristo

Ĝi aperas monate kaj pritraktas ĉiam aktualajn problemojn de l' klasbatalo montrante la veran karakteron de la kapitalismo kaj la necesajn paŝojn por forigi la ekspluatadon. — Tiu ĉi revuo estas gravega batalilo por niaj socialistaj ideoj kaj devas esti abonata de ĉiu aktiva K-do.

Abonprezo kvaronjare nur 0,60 mk. g. Provekzemplerojn vi senpage ricevos de
"ISK"-Expedition, Schlüchtern Nr. 4 (Bez. Kassel), Germanio

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

La Révolution Prolétarienne, Paris, 1. 6. Usona lab. situacio (188); The Shop Assistant (Komiza gaz.), London, 2. 6., Kooper. k esp. (Zavada) (189); Le Matérialiste, Brux.-Laeken, majo Liberpens. kongr. Lodz; Krasnojarska Laboristo, Krasnoj., 13. 4., rolo de luteranaj sektoj (182); Grafika Laboristo, Zagreb, 2. 6., Lab. sanigejoj en Sov. (186, 189).

Priesperant. artik. k notojn enhavis:

D. Deutsche Eisenbahner, Berl., 27. 5. (kurso); Le Matérialiste, Brux.-Laeken, majo; Young Worker (Juna Laboristo), London, 28. 4., 12. 5.; Daily Herald, London, 1. 6.; Le Sincériste, Waltwilder, junio; Accion-Cooperatista, Barcelona, 1. 6.; The Labour Woman (Laboristino), London, 1. 6. (duonpaĝo); Ecole Emancipée, Saumur, 3. 6.; The Educational Worker (Eduklab.), London, junio; Folkets Dagblad Politiken, Stokholmo, 2. 6. (unu grandformata tutpaĝo kun bildoj).

Peresp. leterojn presigis:

Krasnaja Iskra (Ruĝa Fajrero), Baroviĉi, 30. 5., Zvezda, Perm, 1. 5.

Pri SAT k SAT-kongreso raportis:

Brentwood Labour Leader, majo; The Shop Assistant, London, 19. 5. (art. pri "Je la nomo de l' vivo").

Pri nia Vortaro presigis tre favoran, atentigan noton "Vegetarano" (apr.), pro kio ni dankas al la redaktoro.

SAT-anoj

En viaj korespondaĵoj al la Administrejo ĉiam citu vian membro-numeron.

NIA POŜTO

7692. — Anoncojn ni ne publikigas senpage.

3813. — Vian artikolon ni enmetis, kvankam ĝi sciigas al ni nenion novan. Jam delonge la ĉiutagaj gazetoj raportis pri la samaj faktoj. Anstataŭ sendi tian agitecan artikolon, estus preferinde, ke vi priskribu, kiaj estas la labor- k vivkondiĉoj de la laboristoj; kia estas ilia nivelo je klereco k. s.

10 449. — Certe ni deziras reaŭdi de vi. La temoj pri lernejo kaj kamplaboristoj ambaŭ indas pritrakton. — Red.

7997. — Multajn similajn plendojn ni ricevis. Pri la temo vi povas legi la artikoleton de K-do 10 823 en ĉi tiu n-o. Daŭrigu ellerni la lingvon. — E. L.

Zvezda. Ni ne povas senpage enmeti vian noton. — Red.

Marto. — "Sub ruĝaj standardoj" vi bonvolu rekte mendi en Göteborg. Al librejoj ni ne povas liveri ĝin. — Adm.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

BELGIO

K-do A. Dohogne, Rue du Viaduc 19, Verviers, dez. interŝ. PM, kĉl.

BRITIO

K-do Arthur Whitam (1351), Labour Club, Cornholme, Near Todmorden, realiĝas al SAT k serĉas laboron kiel teksisto en Sovetio. Notu la adresŝanĝon!

BULGARIO

K-do G. M. Dimitrov, Gorna Ĝumaia, dankas al ĉ. K-doj en Sovetio por la ricevitaj koresp-aĵoj. Bedaŭrinde laŭ la nuna situacio en B. ne eblas al mi resp. Mi petas pardonon.

ĈEĤOSLOVAKIO

— 10 junaj gek-doj dez. koresp. kĉl. Ĉiu certe ricevos resp. Adr.: Albin Pietschmann, i. Fa. Elias Palme, Steinschönau.

K-do Richard Ackermann, Ullrichsthal, dez. koresp. kĉl. PI, bfl. Precipe kun junaj gek-doj. Skribu multnombre. Resp. garantiata.

K-do Franz Scheibner, Ullrichsthal, Nr. 40, dez. koresp. kĉl. L, PI, bfl. Certe resp. al ĉiuj.

K-do Rud. Hannawald, Neudek, 513 ap. Karlsbad, dez. koresp. kĉl. (krom Germanio), PK, PI, PM.

GERMANIO

K-do Erwin Weise, Kriebitzsch i. Th., dez. koresp. kĉl., prefere kun liberpensuloj k biciklistoj.

— Lab. Esp. Grupo dez. interŝ. PI, ĵurn. k propagandaĵojn por ekspozi kĉl., krom Sovetio. Resp. garantiata. Adr.: R. Rudolph, Olbersdorf, Nr. 160 b ap. Zittau i. S.

— Lab. Esp. Grupo dez. koresp. pri ĉ. temoj, kĉl. Resp. garantiata. Adr.: K. Altermann, Am Markt, Freital i. Sa.

K-do Alb. Dreckstraeter, Kölner Str. 367/1, Düsseldorf, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

— Grupo de lab. sportuloj dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Adr.: K-dino Anne Seifert, Cronenberg, Heidt Nr. 25, Post Sudberg.

K-do Paul Leckebusch, Im Klauberg 11, Solingen, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

SOVETIO

K-dino Heleno Kirjuŝina, Leninskaja 29/35, kv. 50, Minsk, dez. koresp. k interŝ. literaturaĵojn kun loĝantoj de franc-, ital-, hispanlingvaj regionoj.

K-dino R. Sagalĉik, Gogolevskaja 20, Jalta (Krim), serĉas seriozajn korespantojn pri ĉt., interŝ. PK, presaĵojn kĉl. Nepre k akurate respondos.

— Gejunuloj dez. koresp. kĉl., pri ĉ. temoj. Resp. garantiata. Adr.: u. Rodniki, Iv.-Voznesensk. gub., Klubo de laboristoj (V. Bizuk).

— Rusa junulo dez. interŝ. L, PM, kĉl. Resp. garantiata. Adr.: Nikolaj Ermolaev, Nikitinskaja 163, Barnaul (Siberio).

— Gekurŝanoj de pedteknikumo emas daŭre koresp. pri ĉt. kĉl. precipe pri socipolitika k pedagogia temoj. Certe resp. Adr.: Pedagogia Teknikumo, Barnaul (Siberio).

K-do A. Kuliĉenko, str. Anatolio, 206, Barnaul (Siberio), dez. interŝ. PI k koresp. kĉl. pri kooperativaj k sociaj demandoj. Resp. garantiata.

Adresŝanĝo: I. Bespalov, Krasnaja 32, Puŝkina biblioteko, Krasnodar. Ge-SAT-anoj korektu en la Jarlibro 1928.

— Esp. rondeto ĉe redaktejo "Paĥar" dez. koresp. indiv. k kolektive kĉl. pri ĉ. temoj, L, PK, PI, resp. garantiata, ankaŭ kun presejoj k redaktejoj. Adr. Bugurslan, Samar. gub. al Red. "Paĥar" por Esp. Rondeto.

K-do Beitelmacher (oficisto), Grupkom Sovtorgsluĵ 1, Lenin, prosp. Kremenĉug, dez. koresp. pri div. temoj kĉl., precipe pri lab. vivo k movado.

K-do F. Ibragimov, Ŝaĥta 1, Ŝiglovski R.-K. Stalinsk okr. dez. koresp. kun karbministoj kĉl. pri vivdemandoj. Resp. garant.

— 20 rondetanoj dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Adr.: K-do A. Bokarev, ul. Markusa 20, G. P. I. Vladikavkaz.

K-do Marin Nikolao (studento), Kuzneckaja 181, Rostov/Don, dez. koresp. kĉl. L, PK, PI, bfl. Resp. garantiata.

— Studentino k pianistino de vilaĝana teatro K-dino L. Pavlova, Puŝkinskaja 68, Rostov/Don, dez. koresp. kĉl. L, PK, PI.

K-do I. Radoĉin, Georgievskaja 3, Kremenĉug, koresp. kĉl. pri arto, muziko, sporto, foto- k radio-aferoj k. s. — Resp. garantiata.

— Esp. Rondeto Fervojista de Klubo "Lenin", stacio Kremenĉug, koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, L, PK, gaz. ktp. Resp. garant.

K-do Marko Krasilŝĉik (junulo), st. Ĵitkoviĉi Zĵd., selo Ludeniĉi, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

USONO

K-do Louis Obreczian, Nr. 451, clark. st., Ohio, martins ferra, dez. interŝ. PI, bfl. Kolektas precipe tiujn PK, kiuj montras iujn ajn popolmodojn. Neniu restos sen resp.

Jenaj Gek-doj el Kursk (USSR) dez. koresp.

Ekaterino Ŝuvalova (fraŭlino 30 j.), Lisaja gora 1, kv. 14, pri ĉ. temoj.
Nikolao Riŝkov (termezuristo-arbaristo 35 j.), Leninstr. 90, nur kun spertaj esp-istoj pri arto, naturscienco k ĉiutaga vivo, L, PK, PI.
Samuelo Bassin, Lugovaja 30, kun ĉl. gejunularo.
Eŭgeno Afanasjev (junulo 19 j.), Mirnaja 5, kun komunista gejunularo.

Proverbaro Esperanta

laŭ la verko "Frazeologio rusa-pola-franca-germana" de *M. F. Zamenhof*, aranĝis *L. L. Zamenhof*.
Unu volumo in-8, 82-paĝa
Prezo: 1,50 mk. g.
Adm. de SAT.

ENHAVO:

	paĝo
Proletaro kaj tekniko	303—04
La persekutoj en Japanio	304
Jugoslavaj turmentejoj	304
La murgazeto en Sovetio	305
Parizo kaj la parizanoj	305
Vojaĝaj impresoj el suda Ameriko	306
Tago de usona vilaĝano	306—07
Tra Esperantio	307—10
Korespondado	310

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)